

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 26/12/2019 Kvarcentkvindekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#).

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

Entute **777,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **288,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **265,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **224,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)




## Sezonajn Bondeziraĵojn



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*

### Gramatika serio "La Verbo en P.A.G." N.ro.100



Jen ekzemploj de la dua grupo, kies verbojn oni povas jes aŭ ne uzi kun Objekto: manĝi, vidi, kaj provi, kiel "Katoj kapablas vidi en la mallumo" kaj "Katoj facile vidas kurantajn ratojn".

Jen ekzemploj de la tria speco de verbo, la netransitivaj: dormi, veni, kaj ŝanĝiĝi, ĉar oni ne povas dormi aŭ veni aŭ ŝanĝiĝi ion aŭ iun.



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

Se ĉeestas Objekto en la Esperanta frazo, ĝi karakteriĝas per la akuzativo: “La kato vidis la muson”. Normale la kerno de la Objekto estas Substantivo. Kompreneble ekzistas kelkaj naturaj esceptoj al la akuzativo: **1e.** La kerno povas esti Adverbo (“Ni faris multe en unu tago”), kaj Akuzativo ĉe Adverbo signifas normale la movon al ie, kiel en “Ni iros hejmen”. **2e.** Se la kerno de la Objekto estas Infinitivo, ĝi ne povas ricevi la akuzativan finaĵon “-n”: “Ni deziris promeni”.

**Marcel Leereveld.**



## Esperantistoj en Tuvumba

celebris la datrevenon de la naskiĝtago de Zamenhof .



Multaj Esperantistoj celebris la datrevenon de la naskiĝtago de nia amata D-ro Zamenhof ĉe la Pikniko Punkto en Tuvumba, sud-orienta Kvinslando kun babilado, amikeco, tagmanĝo. Linda faris denove pitoreskajn tablo-matojn.

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

Ni ankaŭ promenis tra la parko kaj miris renkonti tre multe da motorciklistoj ,kiuj komencis ludilo- kampanjon por senhavaj infanoj.



Multaj bicikloj kaj rajdantoj kiuj petas ludilojn por malriĉaj infanoj

Anna kaj Oscar Betancourt. Prezidanto Doug Eising.

Peter Danzer



Arbara promonado kun kelkaj Esperantistoj dum Zamenhofa Festo ĉe Pikniko-Punkto en Tuvumba.



## La tempouzo en Esperanto

Kara Marcel,

vi demandas, kion ni legantoj pensas pri certaj aspektoj de la tempouzo en Esperanto.

Kiu venus al la ideo, ke la franca devas havi absolute la samajn esprimmanierojn kiel la inuita?

Bona instruisto instruas lingvon kiel memstaran objekton, ne kiel derivaĵon de la gepatra lingvo de la lernantoj. Do oni lernu ESPERANTON, aŭ pli precize, lernu, ke Esperanto ne estas la konata lingvo kun aliaj vortoj, sed ke ĝi havas siajn proprajn eblojn.



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

En Esperanto ni havas tri tempojn. Por la nuntempo la finaĵo estas -as, por la pasinteco -is, por la estonteco -os. Fino.

Kiam oni lernas Esperanton, oni devas lerni elekti inter tiuj tri la ĝustan finaĵon por esprimi tiun tempon, en kiu oni deziras rakonti.

Aldone Esperanto ofertas -a-vortojn, do vortojn, kiuj montras la kvaliton de io, por montri la tempan kvaliton de okazaĵo en rilato al la elektita tempo: samtempeco = -anta/-ata, pasinteco = -inta/ita, estonteco = -onta/ota. „La letero estis sendita.“ estas frazo, kiun oni (kiel ĉiujn aliajn) unuavice ne traduku en sian nacian lingvon, sed kiun oni komprenu laŭ la Esperanta sistemo: En la pasinteco, pri kiu mi parolas, la sendado de la letero jam estas en la pasinteco. „Kiam vi venos, mi estos manĝanta.“ signifas, ke en la estonta momento, en kiu „vi“ aperos, mi samtempe manĝos. Indiferente, kiel nacilingvaj lingvoj solvas la aferon.

Mi rekomendas:  
<http://esperanto-gramatiko.saluton.dk>



Amike, **Peter Weide**



Kara Roger

Mi dankas vin por la ĉiam ĝustatempa kaj tre interesa gazeto.

Mi deziras al vi feliĉan Kristnaskon kaj prosperan novan jaron.

El Germanujo Amike

**Hermann Kroppenber**



*Kara sinjoro Roger,  
 Agrablajn Festotagojn  
 kaj  
 mi sendas bondezirojn  
 okaze de la Nova Jaro 2020 !*

*Ekzistas 10 ordonoj :*

*Estu:*

- gaja*
- afabla*
- sincera*
- ĝentila*
- honesta*
- pacema*
- lernema*
- modesta*
- diligenta*
- prudenta*

*Kaj, por 2020, sekvas 11-a:*

*Estu kontenta !*



Krome,  
 Mi dankas pro la sendo de la bultenoj  
 pri la Aŭstraliaj Esperantistoj.

Amike, **Det Koning** (Nederlando)



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

## Federacio Esperanto-Bretonio invitas internaciajn Esperantistojn al prelegvojaĝoj

Ĉiujare, s-ino Josette Ducloyer, membro de la FEB\*, organizas rondvojaĝojn tra la franca regiono Bretonio, invitante unu aŭ du alilandajn Esperantistojn por prelegi, cele al kulturaj interŝanĝoj, kaj por esti internaciajn amikajn rilatojn.

Tiu regiono, kiu estas duoninsulo, situas nordokcidente de la lando, inter la manika maro norde, kaj la atlantika oceano okcidente kaj sude.

En ĉiu urbo aŭ vilaĝo, tiuj gastoj devas prelegi prezentante, en Esperanto, iun temon kiun ili bone primajstras, kaj kiu ofte estas sekvata de debato aŭ demandoj far la ĉeestantaro.

Por starigi tiujn turneojn post ilia interarango, Josette Ducloyer, reŝendas al bretonaj asocioj, ĉiujn informojn kaj la pritraktotajn prelegtemojn transdonitajn de la invito.

Post enskribo de la konsentitaj asocioj, ŝi establigas kaj dissendas precizan vojplanon. Tiam, ĉiu asocio organiziĝas por akcepti siajn gastojn kiel eble plej bone.

Tiukadre, en 2019, s-ro Rainer Kurz vizitis bretonajn urbojn, *Rennes*, *Pleudaniel*, *Douarnenez* kaj *Couëron*, kies asocioj gastigis lin. En ĉiu urbo li prelegis en Esperanto pri unu el la kvar temoj elektita de la asocioj :

- . la « laboro por rifuĝintoj ».
- . la internacia filmkonkurso Esperanto 125 jaroj.
- . Stuttgart : beleco, vivo, kaj Esperanto agado.
- . intervjuo kun Nobelpremiito Reinhard Selten.



Nia asocio CELI, el *Couëron* elektis la temon « La laboro por rifuĝintoj en Germanio », kaj kunorganizis la prelegon kun la GLATI-a\* asocio « NOSIG », en amfiteatro de la kulturoteko de *Nantes*. Tiun temon, kiun interpretis francen Luc Gouverneur, prezidanto de CELI, ni elektis ĉar la asocio NOSIG kaj Luc subtenas GLATIajn azilpetantojn, kiuj plejparte fuĝis pro mortodanĝero el subsaharaj landoj, helpante ilin en iliaj longtempaj kaj malfacilaj klopodoj por akiri azilrajton.

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

Rainer Kurz prezentis al ni la situacion de la migrantoj en Germanio kaj sia laboro por rilatigi diplomitajn gejunulojn kun entreprenoj, kiuj povos dungi ilin. Ja certe, la cirkonstancoj en Germanio malsimilas tiurilate la francajn. Tamen la koncepto de ilo, kapablante kunigi kaj kunlaborigi kvar homgrupojn por iu komuna celo (la asocioj, kiuj zorgas pri la rifuĝintoj, la studentoj, kiuj havas eblecon labori pri konkreta projekto, la entreprenoj, kiuj bezonas dungitojn (en Francio, precipe en agrikulturo), kaj fine la azilpetantoj mem, kiuj devas vivteni sin), tia ilo estus tutcerte bonvena kaj taŭga rimedo, kiu ĝis nun tute ne ekzistas. Fakte, ĉiu asocio, kiu helpas la azilpentantoj, laboras aparte en sia angulo kun reto da konatuloj, kaj la rezulto ne ĉiam kontentige efikas.

Tial, post la prezentado de S-ro Kurz, la ĉeestantoj faris multajn interesajn kaj trafajn demandojn. Rainer Kurz malkovrigis al ni modelon, ekzemplon kiu pli-malpli povos inspiri kaj instigi nin. Ni devas nun starigi kune la projekton. Afero daŭrigota...

Christiane Lamy, Luc Gouverneur

\* Federacio Esperanto-Bretonio. Ĝi arigas la Esperantajn asociojn de Bretonio, kaj federas, Bretoniskale, la agadojn rilatantajn kun la internacia lingvo Esperanto.

Por peti inviton, vi kontaktu Josette Ducloyer : [jpducloy@club-internet.fr](mailto:jpducloy@club-internet.fr)

\* Gejoj, lesboj, ambaŭseksemuloj, transgenruloj kaj interseksuloj.

**Christiane Lamy**



**(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)**

## Ar o m o j e n m i a ĝ a r d e n o .

### NUN FLORANTA ARBO.

Nun malmultaj plantoj floras en mia ĝardeno. Sed riĉe floras la tri katalpoj (*Catalpa bignonioides*, *Indian Bean*), originantaj el Brazilo. Iliaj floroj havas bonan aromon, kvankam ne tiom fortan kiom ĝia ĉina fratino, la paŭlovnio, Paŭlownia. La floroj estas facile flareblaj, ĉar pluraj branĉoj pendas ĝis du metroj super la tero. La floroj estas kremkoloraj kun bluaj makuletoj. Se vi loĝas en Melburno, venu por flari ilin kaj rikolti kelkajn branĉetojn. Vi ĉiam bonvenas, kiam mi estas hejme.



Ankaŭ floras nun, ekstere sed sub tegmenteto, la tropika kaesalpinio (*Bird-of-Paradise Poinciana*), kun flavaj floroj kun trioble pli longa ruĝa stameno. Mi fieras havi kreskanta kaj floranta tiun arbuston el tropika Afriko, sed mi zorge flegis ĝin dum pluraj jaroj.

**Marcel.**

### LECIONO PRI LECIONO .

Mi ĝuis legi la interesan kaj utilan artikolon de S.ro Aldridge, "Malfacilaĵoj de la Angla Lingvo". La artikolo instruis min, ke mi devas, antaŭ publikigo, peti anglolingvanon kontroli miajn artikolojn kiam mi diskutas la anglan lingvon (kio malofte okazas, sed ĝuste nun pro Esperantaj eraroj kaŭzitaj pro la eŭropaj lingvoj).

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

Ekster interkrampe: Mi uzas ĝin ne ĉar ĝi estas nederlanda aŭ franca (ĝi ne estas), sed ĉar ĝi estas pli scienca. Se mi estas anglo, mi uzas la saman formon en skribaĵoj.

Ĉiujn anglaĵojn kiujn mi uzis en miaj artikoloj, estis en mia memoro: iam mi aŭdis ilin, kvankam mi ne scias kiu(j) diris ilin, en la ĵusa aŭ fora estinteco. Sed certe angloparolantoj. Mi ne scias, en kiu anglolingva lando S.ro Aldridge loĝas, aŭ edukiĝis, sed aspektas al mi la centro de Anglujo. Mi havas la impreson, ke li scias la anglan lingvon pli edukite ol plej multaj homoj, eĉ en Anglujo. **Marcel Leereveld.**

## HELPILO POR ESPERANTOLOGOJ .

Jen en unu frazo la kreo de la vorto “tialo” el la Adverba Subjunkcio “kial”.

La subjunkcia k-korelativo, se ĝi ne estas kaŝita demando (“Demanda Subjunkcio Adverba), do se ĝi estas ripeta Relativa Adverba Subjunkcio kaj signifas la antecedenton “tial”, havigas sian substantivon “tial’o”, do la kaŭzon/motivon de la ago pridemandata; Zamenhof donis al la demandaj k-korelativoj la ekstran signifon de montra pronomo/adverbo por uzi ĝin por subjunkcie ripeti kaj signifi sian antecedenton. Substantivige ĝi do signifas kaŭzon/motivon (la tialon), ekzemple: “Mi forgesis LA KAŬZON/MOTIVON/TIALON, KIAL (= PRO KIU TIALO) li foriris frue”.

**Marcel Leereveld.**

## LA IMPERFEKTO .

La Imperfekto (aŭ: Daŭra Tempo, aŭ: Kontinua Tempo) ekzistas en pluraj eŭropaj lingvoj, kvankam kun limigoj. Ĝi indikas agon kiu ankoraŭ ne finiĝis, kaj eble neniam finiĝos. Tre ofte ĝi uzatas kun mencio de alia ago kiu interrompas la pluon de la unua ago, ekz. “Ni estis manĝantaj, kiam subite okazis tertremo.”. Ĝi okazas precipe en la pasinta tempo, kaj malpli en la prezenco kaj futura tempoj: “Ne interrompu min ĉar mi estas skribanta leteron”. Ĝi uzatas multe en la hispana kaj angla lingvoj, kaj malpli en la franca. La neanglaj ĝermanaj lingvoj ne ofte uzas ĝin, ĉar ĝi bezonas tie multajn vortojn (komparu anglan “*I was eating my dinner*” kun nederlanda “*Ik was mijn avondmaal aan het eten*”). En la franca ĝi estas unuvorta verbo por la pasinta Imperfekto, sed ne en la plej multaj aliaj lingvoj.

En Esperanto ĝi ne ekzistas kiel verbo, sed nur kiel adjektiva predikativo en ĉiuj tempoj: “Ni estis/-as/-os manĝantaj” kaj “La ludo devis esti interrompata”. Ĝiaj indikiloj estas nur la sufiksoj “-anta” kaj “-ata, kiuj du sufiksoj havas nur la signifon de la Imperfekto. Estas demando, ĉu Zamenhof pravis krei Statan (Predikativan) Imperfekton anstataŭ la verba Imperfekto, sed almenaŭ li tiel evitis krei tri ekstrajn sufiksojn verbajn.

**Marcel Leereveld.**



## La Manlia Esperanto-Klubo

Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm.

Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.



La 21a de Decembro estis la tria sabato. Venis Roger, Michael, John, Ian, Chris kaj Mei.



Post la normala kunveno, ni ĉiuj iris al la Steyne Hotelo apud la oceano por kune manĝi lunĉon.

Tie ni celebris la Festivalan Sezonon kaj Zamenhoftagon. **Roger Springer**

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**



## Interesaj faktoj por Propagando

### *.Lernado de fremda lingvo postulas*

- Lernu legi la skribitan lingvon. Ofte ĝi ne agordiĝas kun la parolata lingvo...*
- Lernu la gramatikon. Ofte ĝi estas plena da esceptoj al la reguloj.....*
- Lernu vortliston taŭgan por via espora uzo.....*
- Lernu la standardan prononcon. Ofte ne agordas kun la parolata lingvo..*
- Lernu la lokan parolatan lingvon.....*
- Lernu la ĉiutage mallongigitan parolatan lingvon.....*
- Lernu la idiomojn de la lingvo .....*
- Lernu kiel kompreni la parolatajn respondojn al viaj demandoj.....*

### Komparu Esperanton

- ..Fonetike senescepta
- ..17senesceptaj reguloj
- ..Kunmetitaj vortoj
- ..Unu prononco
- ..Ne ekzistas
- ..Ne ekzistas
- ..Ne ekzistas
- ..Unu monda lingvo

## Esperanto ne havas tiujn malfacilaĵojn

La plej multaj Esperantistoj lernis Esperanto kiam ili estas plenkreska.

Do ili estas tre toleramaj kaj helpemaj al lernantoj

Roger Springer



### 3ZZZ ...

Pro la ferio, la teamanoj de 3zzz, kiuj preparis la programon de la 23a de decembro elektis paroli pri sano kaj pozitivaj projektoj kiel la lernejo sub ponto en Nov-Delĥio kaj deziras al vi agrablan aŭskultadon kaj ripoztempon



Informas la kunvokanto, Franciska Toubale



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**